

HEJIS

JUNULARA SEKCIO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO


REDAKTORO:
S-RO. MIGUEL A. ALTUNA

N.º 97
Nov.-Dec. 1975

Str. Barrencalle Barrena, 7 - 1.^a
Telefono 424 44 92 - BILBAO-5

H. E. J. S.
DEZIRAS AL VI
FELIĈAN NOVAN JARON
1976





ENHAVO*

* Adiaŭ!.....	1
La virino en Hisp..	2-3
Pasporta Servo.....	3-4
Ĉu niaj virinoj odoras malbone?.La modo.	5-6-7
Kotizoj.....	7
Kiu kio estas?.....	8-9
Junaj postoj en E-o..	10-11
La viro sur seĝoj	12-13
II*HEJS-tendaro kaj ne toj.....	13
La okulo de la morto.	14-15
Deveno de l'muziko...	16

La enhavo de la artikoloj ĉi tie publikigitaj ne reprezentas la oficialan opinion de HEJS, escepte en okazo de oficiala komunikado; ĝi ankaŭ ne reprezentas la opinion de la Redaktoro; do, pri la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

ADIAŬ!

Nu, jaro finiĝas; estas tempo por ĝia adiaŭo. Ankaŭ aliaj adiaŭas. Por ekzemplo, F-ino Inés Gastón, kiu dum pluraj jaroj redaktis la oficialan organon de Hispana Esperanto-Federacio forlasos tiun postenon en la lasta ĉi-jara numero. Ni ege bedaŭras tion, des pli pro la fakto ke eble ne ekzistas iu kiu pretos kaj kapablos preni tiun taskon. Ĉu malapero de Redaktorino signifos ke bulteno ĉesos ekzisti? Ni esperu ke ne.

Ankaŭ mi adiaŭas vin. Ne!, ne timu, ĉar "HEJS" plu aperos. Plenumo de soldatservo postulas mian foriron, sed "HEJS" restas en bonaj manoj, certe pli bonaj ol la ĝisnunaj. Ne, mi ne deziras flati. De la proksima numero Redaktoro estos Miguel Gutiérrez Adúriz, nia vicprezidanto por rilatoj kun TEJO, loĝanta en Santander. Fakte, en ĉiuj ĉi-jaraj numeroj minimume aperis 6 paĝoj de li pretigitaj, kiuj estis la kaŭzo de la akirita prestiĝo. Per li mi antaŭvidas novan linion en la revuo, kiu pli atentos la eksteran ol la esperantan mondon. Ekzemplo pri tio estas la artikolo en paĝo 2-3. Nur mankas al mi danki ĉiujn legintojn kaj kunlaborintojn, kaj peti vian apogon por la nova redaktoro. Ĝis ĉiam!

KelKaj ciferoj Kaj faktoj

pri la virino en Hispanio

La jaro 1975 estis deklarita, kiel sciante, "La internacia jaro de la virino"; tamen dum la tuta jaro neniu artikolo pri ĉi temo estis traktita ene de nia eta revuo, pro la fakto ke la unumura ekzistanta solvo por la "problemo de la virino", laŭ nia kriterio, troviĝas lumjarojn for de la neŭtraleco postulata de nia HEJS-regularo. Do, konsekvence ni nur prezentas kelkajn ciferojn kaj faktojn pri la virino en Hispanio.

• Tri virinoj kaj kvin viroj konsistigas la nacian organon komisiita prepari en Hispanio l'internacian jaron de la virino.

• En 1973 la nombro de aktivaj virinoj en Hispanio estis 3805701, dum la nombro da viroj estis 9630173.

• 38 procentoj el la aktivaj hispanaj virinoj laboras en la agrikultura sektoro; 5 procentoj en la industria sektoro, kaj 57 procentoj en la sektoro nomata "servoj".

• En Hispanio estas proksimume 13 milionoj kaj duono da virinoj kies aĝo estas pli ol 14 jaroj, kaj el kiuj 1,180000 laboras eksterhejme.

• Ok milionoj kaj duono da hispanaj virinoj estas dommastrinoj.

• Cijare ekvalidiĝis la leĝoj kiuj modifas la ekonomian situacion de la edziniĝinta virino, permesante al ŝi administri siajn privatajn bonhavojn sen bezono de edza licenco.

• En nia lando la tipa edzino kiu havas du filojn, uzas 80 horojn semajne por la plenumo de la hejmlaboroj

• En la jaro 1973 ekzistis en Hispanio 1,799500 virinoj, kiuj ne sciis legi nek skribi.

• 90⁴ procentoj de la superaj teknikistoj estas viroj dum nur 9⁶ procentoj estas virinoj.

• En la belartaj lernejoj la procento de virinoj estas 6², kaj en la superaj teknikaj lernejoj nur 2⁸.

• En Hispanio la aktiva virina loĝantaro estas 25 procentoj. En Eŭropo 40 procentoj.

• Laŭ la informo prezentita de l'prezidanto de la supera tribunalo, je la fino de la jaro 1974, ekzistis en Hispanio 800000 virinoj kiuj uzas kontraŭkoncipajn pilolojn, kaj dum tiu jaro oni praktikis 300000 kaŝitajn abortojn.

MIGUEL GUTIERREZ ADURIZ

pasporta servo ★

tejo - Hejs (Gastiga servo)



Pasporta servo, al kiu apartenas la "Gastiga servo de HEJS" (ankoraŭ en eksperimenta stadio de efektiviĝo), celas faciligi ekonomie eksterlandajn vojaĝojn, enkonduki novan formon de kultura inteligenta turismo, kaj ebligi al nevojaĝantaj esperantistoj ĝui kulturriĉajn kaj amikecajn homkontaktojn.

Por la praktika uzo de ĉi servo ekzistas kelkaj reguloj, kiuj estas la jenaj :

1-Pasporta servo estas gastiga servo kiu funkcias surbaze de reciprokeco aŭ de aliĝkotiĝo.

2-La servo publikigas ĉiujare adresliston de esperantistoj kiuj bonvolas akcepti esperantajn gastojn senpage.

3-Tiu listo estas sendata :

-aŭtomate al ĉiuj "gastigantoj" kies adreso estas.

-kontraŭ aliĝkotiĝo al aliaj petantoj.

4-La gastigpetanto mem ekkontaktas la koncernan personon ĉe kiu li ŝatus gastigi kaj faras kun li la necesajn interkonsentojn pri la karakterizoj de la gastado (daŭro, komforto, eventualaj repagoj, ktp).

5-La servo ne povas respondi pri :


- eventuala nekoincido inter la publikigitaj informoj kaj la efektiva plenumo de la gastado.
- problemoj okazantaj se la gastigpetanto alvenas surloke sen antaŭe kontakti la ofertanton , aŭ antaŭ ol ricevi de la ofertanto konfirman respondon pri la gastigo.

(KIEL FARIĜI GASTIGANTO kaj RICEVI LA ADRESLISTON)

Por fariĝi gastiganto oni simple devas sendi al:-- J.M. CASH, 9 rue du Languedoc, F-78690 Les Essarts-le Roi (francio).-- la jenajn informojn: nomo, antaŭnomo, adreso kaj telefono; kiom da kilometroj ekster kiu urbo , ĉu oni disponigas ĉambron aŭ liton aŭ plankon por maksimume kiom da tagoj kaj kiom da gastoj samtempe ; tempo de valideco de la oferto kaj kiom jaraĝaj oni deziras estu la gastoj.

(SE ONI NUR VOLAS RICEVI LA ADRESLISTON ?)

Se tiel estas , oni nur devas sendi l'aligkotizon 10FF aŭ 9 internaciajn respondkuponojn al la supre menciita adreso. La adresliston kun pli ol 100 nomoj de gastigantoj en pli ol 33 landoj estos sendata en februaro-76.



HEJS stendas...
La novan jaron.



Inter la specoj de drogoj, jen preparaĵo, kun ebrigaĵaj kaj narkotaj ecoj , farita el l'supraĵfolioj kaj ankaŭ el la molaj partoj de specio de kanabo, sekigitaj por fumado aŭ maĉado.

Tiu preparaĵo provokas en la homa korpo , intelektan ekscitecon kaj disigecon de ideoj, modifon de la aŭda sentiveco, iluziojn kaj halucinojn.



ĈU NIAJ VIRINOJ ODORAS MALBON

KAJ ALIA GRAVA TEMO:

LA
MODO

Ne troviĝas, karaj virinoj, malbona intenco en ĉi tiu skribaĵo; male, mi celas helpi vin laŭ mia modesta kapablo samtempe klopodante kompreni vin pli bone, kio estas afero -mi devas konfesi- ne ĉiam facila.

Por ke neniu trompiĝu ĉe la titolo, legiĝas "niaj virinoj". Tiu esprimo ne signifas ke ni, hispanaj viroj "havas" kelkajn virinojn, kiel riĉa arabo; tute ne. La vortoj "niaj virinoj" rilatas la virinojn, kiuj vivas en nia nuntempa kaj moderna socio, kaj precipe mi celas la hispanan, kun kiu mi kunvivas.

Cu niaj virinoj odoras malbone? Jen demando, kiu tre interesas min kaj kies respondo ne estas klara. Tamen, se mi rilatigas tiun demandon al la granda amaso de produktoj reklamataj per ĉiuj nunaj informiloj, produktoj kiuj, laŭdire, evitas la malbonodorecon de niaj virinoj.

La respondo, nepre, devas esti jesa.

Laŭ tiuj anoncoj niaj virinoj odoras malbone ĉiuloke: en la hejmo, en la aŭtobuso, en la flughaveno kaj en aliaj multaj lokoj, ne menciante -vi ĝin imagu- ke la amo ofte dependas de tiu malbona odoro. Nu, ni viroj, kion faru? Cu tio estas vero aŭ ne? Cu ni devas flari ĉiun virinon por konstati ĉu la afero estas vera aŭ ne? Vi mem komprenu, tio estas ridindaĵo.

Feliĉaj ni estas (tio estas mia opinio) viroj de la moderna vivo, ĉar mi pensas kiom devis suferi niaj avoj kaj praavoj flarante siajn malbone

odorantajn virinojn, ĉu ne?

Ni devas danki la penon de niaj virinoj por agrablighi nian vivon. Pro tio, mi konsilas al ĉiu viro, ke li ne estu avara kaj komplezu sian edzinon kaj filinojn aĉetante tiujn produktojn kiuj preventas aŭ evitas iliajn malbonajn odorojn. Kompreneble, se via edzino estas maljuna la afero ja ne gravas.

L-A M-O-D-O Jen alia faceto de la vivo, kiu ĉefe rilatas niajn virinojn, kvankam ni viroj ankaŭ ne restas for de tiu inklino. Mi multe miras kiom facilanime la virino akceptas kiun ajn modon.

Virino el Londono diras: "Ho, ve!, virinoj, vi devas surmeti jupeton ĉar tiamaniere vi estos pli belaj, pli allogaj, ktp." Kaj, efektive, niaj virinoj malkovras, ke tiu londonanino pravas. Alia sinjoro el Parizo diras, ke la virino jam devas surmeti longan jupon aŭ vestaĵojn longajn ĝis la piedoj, ĉar ili estas pli belaj, pli allogaj, ktp. Kaj jen surprizo: niaj virinoj malkovras ke tiu parizano pravas. Ne gravas ĉu estas somero kaj varmo estas forta. Ha!! tiel estas la modo. Aliaj gesinjoroj opinias, ke la virinoj devas uzi pantalonon, ĉar tiamaniere ili estas pli belaj, pli allogaj, ktp. Jen miraklo, niaj karulinoj tuj komprenas, ke tiuj gesinjoroj pravas kaj rezulto estas ke ĉiu virino posedas pli da pantalonoj ol kiu ajn viro. Alia sinjoro, mi ne scias el kia lando, diras: "virinoj, montru vian dorson kaj parton de via busto", kaj, jen, niaj virinoj entuziasme obeas, ĉar ili estas pli allogaj, pli belaj, ktp. Alia sinjoro diras: "uzu tiujn ŝuojn kun tiel alta kalkanumo, ĉar vi estos pli belaj, pli allogaj", kaj niaj virinoj konstatas ke efektive tiu sinjoro pravas, malgraŭ tio, ke ili ofte malfacila povas piediri.

Multajn aliajn ekzemplojn mi jam povus priskribi, sed mi pensas ke kiel specimeno sufiĉas butono-hispana proverbo.

La grava demando estas, mia opinio, kial niaj virinoj devas atendi, ke grupeto da gesinjoroj decidus kiaj vestaĵoj taŭgas aŭ ne? Persone mi ne scias tion respondi. Eble doktorinoj estas en Esperantujo, kiuj kapablos klarigi la aferon.

Malgraŭ ĉio, ni viroj de la moderna nuntempa vivo, devas senti nin feliĉaj, ĉar mi pensas, kiom devis suferi niaj avoj kaj praavoj, kiam iliaj virinoj ne povis elekti siajn vestaĵojn inter tiel granda amaso de homoj ekzistantaj nuntempe.

Mi konsilas al vi, viro de la moderna vivo, ne estu avara kaj komplezu vian edzinon kaj filinojn, kiam ili petos al vi monon por aĉeti la lastan vestaĵon de la lasta modo. Kompreneble, se via edzino estas maljuna la afero ne gravas.

Kara legantino, mi ne scias ĉu vi konsentas kun mi aŭ ne, sed jen facetoj de nia ĉiutaga vivo, kiuj estas ofte konstataj kaj kiujn mi ne ĉiam komprenas.

Luis Serrano Pérez
Sabadell

KOTIZOJ

Malagrabla afero, sed ĉiam necesa. Jes, jaro pasis kaj nova jaro havos novajn elspezojn, kiuj devos esti kovritaj de la enspezoj per kotizoj. Kiel vi scias, ĉar inflacio forte malaltigis la efikon de la mono, en la HEJS-kunsido okazinta dum la tendaro en Zaragoza oni decidis starigi novajn kotizojn: 150ptoj. por la enlando, kaj 200 por eksterlando. Tio simple atingas kovri elspezojn de eldonado kaj administrado. Por pligrandigi nian kapitalon kaj tiel esti pli liberaj por aliaj iniciatoj, ni petas al vi bonvolan kroman pagon de 50ptoj., do, entute, 200ptoj.

Pagon vi povas efektiviĝi pere de via delegito, per banka transpago al nia konto 01-3322355 de "banco de Vizcaya", aŭ per poŝtmandato al nia konto nº00569143 de "Caja Postal de Ahorros". En neniu kazo sendu monon je la nomo de estrarano.

Bonvolu ankaŭ indiki vian aĝon, por distingi inter apogantoj (pli ol 30-jaraj) kaj plenrajtaj membroj.

HISPANE-HISPANE-HISPANE-HISPANE-HISPANE-HISPANE
Como siempre, llega la hora de pagar las cuotas. Como sabéis, son 150Pt, aunque agradeceríamos 200. Pagad por medio del delegado, o directamente a nuestra cuenta 01-332235-5 del Banco de Vizcaya, o por giro postal a la cuenta 00569143 de la Caja Postal de Ahorros. Por favor, indicad vuestra edad. 7

KIU KIO ESTAS?

Li naskiĝis en Sabadell, la 31-an de januaro 1936, en la sino de tre konata esperantista familio. Poste, li definitive loĝis en Barcelono, kien lia patro, nun jam emerita, devis translokiĝi por labori kiel instruisto ĉe liceo tiurba.

Estante 16-jara li ekesperantistiĝis en kursoj, kiujn lia patro, prof. Jaime Aragay Pujols, gvidis ĉe "Kataluna Ekskursu Unuiĝo" en Collblanc (Hospitalet de Llobregat) kaj "Radio Club" de Barcelono.

Kiam 21-jara li soldatis en Gerona, li jam komencis plani la kreon de la Junulara Sekcio de Hispana Esperanto-Federacio, kiun Sekcion li poste fondis en Barcelono kun la helpo de kelkaj junaj kunlaborantoj. Tiel naskiĝis la nun oficiala HEJS.

El lia plurjara aktivado sur la junulara kampo, mi speciale volas menciigi ĉi tie jenajn du Esperanto-eventojn, kiujn travivis HEJS danke al lia organiza kapablo kaj senlaca persisto. Temas pri la okazigo en Tarragona de la 24-a Internacia Junulara Esperanto-Kongreso de TEJO, kies bela aranĝo meritis ĉies laŭdojn. Por la unua fojo en la historio de la Esperanto-Movado nialanda, tutmonda kongreso de junaj geesperantistoj estis sukcese organizata.

La dua estas la fondo de la nuna HEJS-restadejo en Monistrol de Montserrat (Barcelono), en pitoreska pejzaĝo, sub la turisme fama montaro Montserrat (=Monto segita), kies konstruon ankaŭ oni ŝuldas al lia abnegacia entuziasmo. Tiu esperantista Junulara Domo situas, kiel la tiea strato Zamenhof, ĉe kruciĝo de ŝoseoj, apud du fervojaj linioj kaj en la najbareco de la konata rivero Llobregat. Ĝin oficiale inaŭguris la 30-an de julio 1968, la tiama HEF-prezidanto prof. Miguel Sancho Izquierdo kune kun la estraro de TEJO kaj ceteraj gekongresanoj okaze de la nomita Internacia Junulara

Esperanto-Kongreso en Tarragona. Dum sia parolado, la tiutempa ĝenerala sekretario de TEJO, D-ro. H. R. Tonkin, kiu estas la nuna prezidanto de UEA (=Universala Esperanto-Asocio) diris interalie pri la HEJS-restadejo jenajn vortojn: "Certe mi devas konkludi, ke ĉi tiu inaŭguro estas unika ne nur en la landa junulara movado sed eĉ en la internaciaj kongresoj de TEJO. Tiu sukceso mirigas min ĉar mi konstatas, ke ĉi tiu hispana sekcio de TEJO estas tiel granda kaj forta, ke ĝi entreprenas planas, organizas propran junularan restadejon. Do, montriĝas, ke nia organizaĵo TEJO ne nur zorgas paperaĵojn, informojn, revuojn, korespondadon, bulleton, ktp., sed ankaŭ ĝi pravas sian kapablon efektivi konstruon de restadejo, kio ja estas afero tre grava kaj imitinda".

Nun ĝiaj instalaĵoj ankoraŭ kompletigis interalie per eta naĝbaseno kaj diversaj fruktarboj, kio oferas al la eventualaj vizitantoj agrablajn tagojn de ripozo, ĉion ĉi do realigis junulo kun volo, juna ĝisosta esperantisto.

Mi povus ankoraŭ multe skribi rilate lian tre pozitivan agadon en la enlanda Esperanto-Movado, por kies Junulara Sekcio li altruisme sin dediĉis dum longa tempo, sed tio estus ja iel perforti la denaskan modestecon de nia protagonisto, kies identigon kredeble multaj legantoj jam devonis. Li estas nia estimata amiko s-ano. Salvador Aragay Galvany, kiun oni proponis nomi Honora Membro de HEJS en la III^a Aŭtuna Junulara Renkontiĝo okazinta en Calafell (Barcelono) la tagojn 25, 26 de oktobro.

V. Hernández Llusera
Sabadell

■ Ni ĝojis ricevi la spontanen proponon pri honora membrigo de nia fondinto kaj longdaŭra aktiva prezidinto. Ni esperas ke, laŭ artikolo 11/3 de nia Regularo, la HEJS-kunsido okazonta dum la tendaro en Santander unuanime subtenos ĝin.

Ne ankoraŭ finiĝis lia okupiĝo kaj helpado al HEJS, ĉar li donacis 10000 optojn por la presita eldono de la 100^a numero. (Red.)

JUNAJ

POETOJ

EN ESPERANTO

Amiko Miguel Altuna honoris min per sia peto, ke mi verku pri "junaj poetoj en Esperanto" por la simpatia bulteno de H.E.J.S. La proponita temo iomete perpleksigis min pro siaj multaj ebloj de interpreto. Por ekzemplo: ĝis kiam poeto estas kronologie juna? Ĉu junan oni diru nur al la bardo, kies versoj teniĝas al la modernaj tendencoj temaj kaj stilaj? Ĉu la titolo estas invito revui kaj analizi la verkojn de niaj junaj poetoj, se tiaj ekzistas nuntempe en Esperantujo? Ĉu ni limiĝu, preterante la tradukantojn, al la junaj poetoj, kiuj originale verkas en Esperanto?

Nu, super tiuj, kaj aliaj eblaj distingo, mi opinias, ke junaj poetoj en Esperanto apenaŭ ekzistas aŭ ekzistis. La kaŭzo evidentas. Vera poeto posedas denaske sensivecon kaj intuon lirikan, sed li devas akiri kompletan scion de sia lingvo kaj manipuli ĝiajn plej subtilajn risortojn, se li volas sukcese doni plastikan formon al sia idea mondo. Vere juna kaj samtempe genia poeto -kiel, por ekzemplo, Federico García Lorca- eblas en la sfero de la naciaj lingvoj, ĉar li lernas kaj asimilas, jam de la unuaj tagoj de sia vivo, la paŝtran lingvon, kaj majstras ĝin pli malpli rapide en postaj stadioj. Sed la poeto en Esperanto ĝenerale komencas akiri la internacian lingvon almenaŭ en siaj knabaj jaroj, kaj la plena ensorbo de ĝiaj strukturo kaj spirito daŭras dum ok aŭ dek jaroj da intensa kaj senĉesa studo. Tial, kiel montras la historio de la Esperanta poezio, niaj elstaraj poetoj komencas verki siajn unuajn solidajn provojn, kiam ili estas proksimume 30-jaraj. Baghy, naskiĝinta en 1891, publikigis Preter la vivo en 1923. Kalocsay, same naskiĝinta en 1891, verkis la poemaron Streĉita kordo proksimume en 1930. Tárkony naskiĝis en 1904, kaj liaj unuaj ver-

saĵoj aperis ĉirkaŭ 1930. Auld naskiĝis en 1924 kaj ne komencis poeziumi ĝis 1949.

Niaj junaj poetoj, do, ne povas esti tre junaj ĉar, kiel dirite, ili devas dediĉi ne malmultan tempon al la tasko profunde asimili al si la lingvon. Kiel escepton, kiu konfirmas la regulon, oni povus mencii, por ekzemplo, la kazon de Passos Nogueira, naskiĝinta en 1949 kaj publikiginta jam en 1972 sian rimarkindan Vojo kaj vorto kun belaj pecoj originalaj kaj tradukitaj.

Al niaj junaj aspirantoj al la bela titolo de Esperanta poeto, mi konsilus ne tro rapidiĉe, ĉefe kaj unue klopodi majstri la lingvon, analizi la teknikon de niaj ĉefaj poetoj klasikaj kaj modernaj, prove tradukadi el la poezio de sia nacia lingvo en Esperanton, laboregi kun asketa fervoro dum pluraj preparaj jaroj antaŭ ol publikigi eĉ unu solan linion, esti ĉiam nekontenta rilate al siaj propraj kreaĵoj kaj konstante ilin poluri, ĝis ili akiros la plej eblajn klaron kaj simplon en la formo, eĉ se ili kaŝas la plej grandan subtilon kaj rafinitecon en la esenco.

La providenco donas la inspiron kaj la talenton, sed ili valoras neniom, se oni ne ekzercas ilin per metoda kaj persista laboro.

Ĉu junaj poetoj en Esperanto? Mi ege ĝojus, se ekzistus multaj fervoraj junuloj kun la deziro kaj la forto fariĝi ne tiel junaj, sed vere brilaj poetoj.

—Fernando de Diego

■ Permesu al mi ion aldoni. Kiel li skribas je la komenco de sia artikolo, mi petis al S-ro. de Diego lian kunlaboron por plialtigi la kvaliton de tiu ĉi numero danke al lia majstra plumo. Krome, mi ĝojas sciigi al vi novaĵon: S-ro. de Diego, kiu kun perfekta fideleco tradukis plurajn verkojn de la hispanlingva literaturo, ĵus finis tradukadon de la tuta Don Quijote. Sen komentoj...

(Red.)

LA

SUR

SEĜOJ

— VIRO — LA —

La familio iris al la kinejo. La patro iris al la fenestro kaj aĉetis tri biletojn.

"Ĉu ni sidas en la supra parto de la kinejo?" demandis la knabino.

"Ne", respondis la patro, "Bileto por la balkono estas altkosta (1). Ni sidas en la malsupra parto de la kinejo." La familio marŝis al la pordo, kie staris la gvidistino.

"Bonan vesperon!" ŝi diris, "Ĉu vi havas biletojn?"

"Jes," respondis la patro, "ni havas biletojn. Jen ili estas."

"Mi dankas vin. Lo, dudek unu, dudek du kaj dudek tri. Venu kun mi, mi petas."

La grupo marŝis kun ŝi de la pordo al la seĝoj. Ili haltis apud linio Lo. Sed sur la seĝoj por la familio, kuŝis viro! Li kuŝis sur la tri seĝoj!

"Pardonu min, sinjoro," diris la gvidistino, "sed la tri seĝoj ne estas por vi. Sinjoro, ĉu vi havas bileton? Kie estas via korekta seĝo? Kiu estas la numero sur via bileto?"

Sed la viro ne respondis. Li nur kuŝis kaj diris "oooooO!" "oooooooooO!"

La gvidistino diris, "Pardonu min!" al la familio, kaj iris al la oficejo de la estro. Ŝi revenis kun la estro de la kinejo, kiu estis granda viro. Li diris,

"Pardonu min, sinjoro, sed vi sidas en la malkorekta loko. Mi petas al vi, iru al via korekta seĝo. Seĝoj dudek unu, dudek du kaj dudek tri estas por la personoj apud mi."

Sed la viro ankoraŭ ne respondis. Li nur kuŝis kaj diris, "oooooO!" "oooooooooO!"

Do, la estro de la kinejo iris al policisto, kiu staris apud la kinejo. La policisto marŝis kun la estro al la seĝoj, kie kuŝis la viro. La policisto diris al la viro,

"Bonan tagon, bonan tagon, bonan tagon! Kio

estas la problemo? Sinjoro, ĉu vi dormas? Sinjoro, ĉu vi havas bileton? Sinjoro, de kie vi venis?"

"La viro respondis, "oooooooo0! ooooooooo0! ... de la balkono!"

EJANZ

(1) En Nov-Zelando la prezkategorioj por kinejoj estas malsamaj. Koran dankon al la Nov-Zelanda junulara organizo pro la artikolo sendita. (Red.)

II^a HEJS-TENDARO ; NOTOJ

-Inter la 15^a kaj 18^a de aprilo, ~~ta~~, dum la Paska Semajno, nia II^a Tendaro okazos en Santander. Estu certaj, ke ĉi-jare ĉio estos multege pli bone aranĝita. Kun la proksima numero vi ricevos la aliĝilon. Ĉiuj al Santander!!

-Du novaj libroj estas je via dispono en nia libroservo. Doktor Esperanto (hispane)...150, toj. La Doloro (poezio).....150 "

-HEJS devas konservi almenaŭ unu ekzempleron de ĉiu numero de nia revuo. Por pli bona konservado ni bindigos ili. Tamen, markas al ni ekzemplero de kelkaj numeroj antaŭ la translokiĝo de la sidejo al Bilbao. Ili estas n-oj. 1 ĝis 19 inkluzive, 26, 28, 29, 46, 49, 50, 51. Se vi disponas pri iu el tiuj, bonvolu doni ĝin al ni, por ke ni havu la kompletan kolekton. Dankon.

-La premio "klara Silbernik" estas starigita por premii edzinon de esperantisto, kiu plej abnegacie helpis sian edzon en lia agado por E-o. Tiel la proponanto kiel la proponatino devas aparteni al iu el jenaj organizaĵoj: HEF, HEJS, UEA, TEJO, HEI. Proponojn oni sendu al Hispana Esperanto-Muzeo aŭ Centro de Esperanto Sabadell. Limdato: 15^a aprilo.

-Germana Esperanto-Junularo starigis "junularinterŝanĝan servon". Ĝi disponigas al vi senpagan loĝadon ĉe familio de esperantisto. Por pliaj detaloj, skribu, aldonante internacian respondkuponon al: Christof Roether, Carlo-Mierendorff-Str. 73 D-61 Darmstadt-Eberstadt.

-Venontjare, inter la 8^a kaj 29^a de aŭgusto, okazos en Antwerpen la 3^a sesio de la Someraj Universitataj kursoj. Studobjektoj estos biologio, matematiko kaj sociologio. Oni povas ĉeesti dum 1, 2 aŭ 3 semajnoj. Informoj ĉe: SUK, B. P. 9, B-4000 LIEGE 3 (Belg)

2

NI TROVIS VENUSON LOĜEBLA SEA DEZERTA; DO, NI ALTERIĜIS POR ESTI LA UNUAJ TERANOJ KIUJ SIAJN PIEDOJN METOS SUR ĜIAN VARMAN KAJ HUMIDAN SURFACON.



NI ESPLORU TIUN KONSTRUAĴON!

APENAŬ NI ALPROKSIMIĜIS AL TIU KONSTRUAĴO, KIAM KELKAJ SFERAJ OBJEKTOJ APERIS ŜVEBANTE SUPER MONTETO.




KIO ESTAS TIO? ĈU GLOBOJ?

MINE SCIAS, TAMEN ESTAS PLI BONE KE NI ENIRU!


DUM NI ENKURIS EN LA KONSTRUAĴON, NI ĴUDIS PAŜOJN INTER NIAJ PIEDOJ, KAJ JEN, ESTAĴO SIMILA AL RATO ELIRIS RAPIDE TRA LA PORDO.




IMPULSITAJ DE ĜA MISTERA FORTO, LA SFERAJ OBJEKTOJ ESTIS JAM PRESKAŬ ĈE NI. IJU ESTIS LAKTOBLANKAJ, KAJ ĈIU HAVIS UNU RONBAN NIGRAJN KIU ĜIRIS KIEL LA PUPILO DE GIGANTA OKULO.



MINU EL ILI, ALMENAŬ DU METRA, FALIGIS SIN SUR LA ESTAĴON KIU JUS ELKURIS TRA LA PORDO. KVAZAU AERVEZIKO, TIU AĴO METIS SIN SUR SIAN VIKTIMON MALAPERIGANTE ĜIN EL NIA VIDADO TRA SIAN MASON.



LA ALIAJ ENTOJ GRUPIĜIS KVAZAU OKULOJ, ĈE LA MALFERMITAJ PORDOJ KAJ FENESTROJ, KUN SIAJ NIGRAJ PUPILOJ DIRERTITAJ AL NI KAJ ELSENDANTE SIBLAJN SONOJN. KUN TENURO NI VIDIS KIEL ILI MALDIKIBIS.



SE ILI PLUMALDIKIBAS, PAFU, ĈAR ILI ENIROJ!

LA KUGLOJ PERDIĜIS SENEFINE TRA LA BLANKA
KVAZAPROTOPIASMA MASO, SED LA ESTAĜOJ SIMILAJ
AL OKULDO, UNU POST LA ALIA KREVIS KAJ FALIS TE-
REM, KIAM IU KUGLO TRAFIS BIAJN PUPLOJN. BAL-
DAŬ ĈIO ESTIS KOVATA DE GRILATAJ MASOJ.




MI EKKURIS AL LA ŜIPO, SED TUJ KIAM MI EKSTERIĜIS, UNU
EL LA ESTAĜOJ, KAŜITA SUR LA TEGMENTO, ĴETIS SIN SUR
ULLRICH-N. MI VIDIS LIN MALAPERI ENEN BELA KARNO-
VORO. MI NE PAFIS ĈAR MI TIMIS VUNDI ULLRICH-N.
NENION MI POVIS FARI KROM FUĜI!



LA OKULD PERSEKUTIS MIN, SED
MI ENKURIS EN LA KOSMOŜIPON
KAJ MANIPULIS LA ILUJN, KIUMFER-
MIS LA PERBEKORDON.



MALSANA DE MALSPERO, MI EK-
FUNKCIIGIS LA RAKETOJN, KAJ SEN
PLIAJ Priprenoj MI TRAIVIS LA NU-
BAN ŜILDON. MANKIS ULLRICH KAJ
MALHILITE GRAVIS POR MI, ĈU MI A-
TINGOS AŬ NE LA TERON.




KIAM MI TURNIĜIS POR ALĜUS-
TIGI LA KONTROLILOJN, TERURA
VIDAĜO APERIS ANTAD MI.



TIE ESTIS UNU OKULO! EBLE ĜI ENIRIS DUM
MI DEFENDIS MIN KAJ REDUKTIĜIS POR KAŜE
KIENDI. MI SERĈIS MIAN PISTOLON, SED
TIAM, IU STRANGA GASTO VERDA ELSPRU-
CIS EL LA GLOBO TRAFANTE MIAN VIZA-
ĈON.



TIU VERDA GASTO TUJ PARALIZIS MIN. MIA PISTOLO
FALIS PLANKEN. MI ESTIS TUTE SENDEFENDA AN-
TAD TIU TERURA ESTAĜO.



la deveno de l' arta muziko

(graka fabalo)

En antikvaj tempoj, longe antaŭ Homero, vivis juna pastisto, kiu pastis safaron sur la herboriĉaj deklivoj de Parnaso. Iun tagon li transis kanon, boris en ĝi truetojn kaj eltiris el ĝi sonojn de rava dolĉeco. Ĝoje li invitis la amikojn, ke ili faru la samon. Sed ili mokis lin: "Ĉu ne sufiĉas la kanto de l'birdoj, kaj la melodia voĉo de l'junulinoj? Por kio ni bezonas novan muzikon?" Sed la pastisteto persistis kaj la junaj pastistoj el Parnaso iris por demandi la saĝulojn de Grekujo.

"Ho, respektindaj saĝuloj", ili diris, "ĉu ebla estas arta muziko?"

Kaj la respektindaj saĝuloj, post longa meditado, karesante siajn blankajn barbojn, respondis fine per serioza voĉo: "He, pastistetoj, tia muziko estas neebla, ĉar ĝi neniam ekzistis, kaj eĉ, se ĝi estus ebla, ĝi estus kiel la lingvaĉo de l'barbaroj - nur sovaĝa miksaĵo, interfrakaso de sonoj, netolebla por ĉiu delikata orelo."

Triumfante revenis la pastistetoj al sia safaro kaj ree mokis la tro genian kamaradon. Sed obstina li restis. Senhalte li transis kanojn kaj sense invitadis al ludo siajn kunulojn. Fine ili konsentis kaj el la boritaj kanoj ankaŭ siavice eligis sonojn de rava dolĉeco...

Tiel naskiĝis la arta muziko. Ĝi ne ĉesigis la kanton de l'birdoj, ĝi ne mutigis la melodian voĉon de l'junulinoj. Ĝi vivas, saĝuloj de Grekujo, kaj tiom longe ĝi vivos, kiom longe ekzistos homoj.

(El "LA JUNA VIVO", oktobro, 1935)

DEZIRAS KORESPONDI...

17-jara pola junulo. Li interesiĝas pri ĉiuj te-
moj. Li tre ŝatas futbalon.

Paweł Janowczyk, ul. Hibnera 6³/₄

PL-60-224 POZNANI (Pellando)